

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

septembro - oktobro 2005 • numero 77 | volumo 13 - numero 5



Dennis Murphy, nia marionetisto

ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Numero 77 • Vol 13.5 • Septembro–Oktobero 2005

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis preparita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, per uzo de la programo Pages, kaj la tiparoj Futura; Onyx; kaj Tempo de (Franko Luin).

ABONOJ KAJ PASINTAJ NUMEROJ

Membrokotizo/Abonprezo: \$A30.00.

Pagu al: **Libroservo de AEA**

143 Lawson St, Redfern NSW 2016.

libroservo@esperanto.org.au

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *ĜJK* kostas A\$3.00+poŝtendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas el: <http://www.esperanto.org.au/>

ĜJK estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643

York WA 6302

Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

esk@esperanto.org.au

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn de AEA, aŭ de NZEA.

© 2005 AEA & NZEA. Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *ĜJK* preparis Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

Akcidento de historio (Dennis Murphy).....3	
Nova litovia poŝtmarko..... 4	
Biografio de Audrey Felby..... 5	(Katja Steele)
Pri la somerlernejo 6	Melburnaj Esperanto Lernantoj Marcel Leereveld
<i>Gerda malaperis</i> — nova kompakta..... 7	disko
Kio estas hajko? (Tony Peterson)..... 8	
Interrete: Ĉu vin interesas artaĵoj?..... 9	
Filmrecenzo: <i>Jason kaj la argonaŭtoj</i> .. 10	(Tony Peterson): esperantlingva..... 10 anglalingva..... 11
Interrete..... 12	
Diversaj/Variouse..... 13	
Tri novaj libroj..... 14	
Pri la pretigado de <i>ĜJK</i> (D.B.)..... 15	
Nekrologo: Don Pescot (S. Kanaĉki)..16	
Mallonga klarigeto..... 17	(Marcel Leereveld)
<i>Mummy, Why Can't We All Speak..... 18</i>	<i>the Same Language?</i> (rec. M. Leereveld)
Interrete: novaj ludoj.....20	
Raporto el Indonezio.....21	(Hazairin Junep)
Deziras korespondi..... 22	
Noticoj pri la Nitobe-Simpozio 23	(Trevor Steele)
For the Beginner (Masterton 26	Esperanto Club)
Adelajdo eksperimentas.....29	(Trevor Steele)
La speciala konkurso..... 30	La respondo kaj la gajnintoj

AKCIDENTO DE HISTORIO

DE DENNIS MURPHY



Je la pasintaj 15 Zamenhof-festoj en Sidnejo, la programo inkluzivis pup-teatraĵon. Denny Murphy prezentas tion. Li estas pupludisto kiu parolas la anglan per usona akĉento kaj esperanton per itala akĉento. Se oni demandas al li, kiel estas ke eksusonano loĝas en Aŭstralio kaj specialiĝas pri italstila pupteatro, li diras, ke la mallonga respondo estas “pro la milito en Vjetnamo”. Sekvas la longa respondo:

Mi estas “Akcidento de Historio”. Kiam mi finstudis en la gimnazio en Usono en 1964, la milito en Vjetnamo furoris kaj estis deviga armea servo por ĉiu viro kiu ne nomiĝas “Bush”. [☺] Tiuj devigitoj estis en la armeo dum du jaroj, kaj volontuloj servis dum tri jaroj. La avantaĝo de volontulado estis, ke oni povas elekti aŭ sian okupon armean aŭ sian servlokon. Mi ekzameniĝis per

arme-inteligenta ekzameno. Alrigadante demandojn kiaj “Ĉu vi preferas marŝi aŭ miksi koktelson?” mi ĉiam preferis la koktelsan elekton.

Tamen, oni informis min, ke la rezultoj montris, ke mi estus bona piedsoldato. Mi decidis volontuli. Por eviti batalon mi elektis postenon de komizo/tajpisto kaj poste subiris alian ekzamenon por kvalifikiĝi kiel hispanlingvisto, danke al kvar jaroj da hispanlingva studo en la gimnazio. La armeo, laŭ kutima militeca inteligenteco sendis min al Germanio.

Alveninte en Germanio mi ekamis Eŭropon. Tiam Historio ektrafis la aferon kaj la Armeo decidis relokigi mian trupon al Texas. Kiam mi diris, ke mi preferus resti en Eŭropo, ĉiuj opiniis, ke mi freneziĝis. “Sed ni revenas al la ‘mondo!’” — tiel ili nomis Usonon. (La nuraj homoj pli parohismaj ol la averaĝa usonano estas la averaĝa usona militdevigato en fremda lando.)

Post nesukcesaj petoj por transigo el mia trupo mi havis nur unu elekton — mi devis realiĝi al la Armeo. La resto de mia unua aliĝo estis nuligita. Do mi rekomencis mian trijaran deĵoron, sed povis elekti aŭ alian postenon aŭ alian lokon. Mi diris “Sunbrilan Italion, mi petas”. Mia avo patrina naskiĝis en Italio. Malbonŝance la nuran italaĵon kiun li instruis al mi estis kalkui ĝis dek. Migrantoj enmigris Usonon por iĝi usonanoj. Estis nenia multkulturismo en tiuj nigraj/blankaj tagoj.

Mi sendiĝis al Vicenza, bela urbo en

norda Italio, nur 45 minutojn for de Venecio. Ĉiutage mi renkontiĝis kun italaj oficiroj. Kiam oni prezentis min al unu el tiuj, mi diris, ke mi deziras lerni la italan. Konvinkite pri mia sincereco, li respondis, “En ordo. Jen la lasta fojo kiam mi parolos al vi angle”. Post tri monatoj mi estis preskaŭ flua parolanto. Mi tiam kvalifikiĝis kiel itallingvisto, sed tio ĉi ĥaosis mian Militan Postenkodon. Kutime sescifera numero, la mia kreskiĝis ĝis dek. Mia privata dosiero ankaŭ postulis vojaĝlimojn.



Ĉar mi havis rajton scii Gravajn Sekretojn, mi ne povis vojaĝi preter la Fera Kurteno — tio riskigus, ke bela komunistino delogus min kaj ekhavis la sekretojn.

Pro la vojaĝlimigo kaj la nekutima Postenkodo (mi ne menciis la fojfojan punaferon — mi ne estis bona soldato) mia dosiero iĝis iom dika. Tio estis bona. Mi konvinkiĝis, ke dum la tri jaroj

kiam la Armeo taksis armeanojn por elekti tiujn kiuj iros al Vjetnamo aŭ revenos al Usono, mia dosiero estis remetita en la dosierujon pro malfacilo trakti ĝin.

Dankon al vi, Historio. Mi ĝuis tri mirindajn jarojn en Italio. Estis ankoraŭ ja la Armeo, sed la semajnfinoj estis ĝuplenaj — Ne estis longa aŭtomobilveturo al Francio, Svislando, Aŭstrio, Germanio kaj Jugoslavio. (Jen alia regulrompa peko.) Mi lernetis iom de la germana, franca, kaj serbokroata lingvoj, pro provo “kompreni unu la alian” sed ĉefe por renkonti fraŭlinojn.

Mi aliĝis al la vicena esperanto-klubo kie mi renkontis amikojn kun kiuj mi ankoraŭ kontaktiĝas post 37 jaroj. Post mia ekŝiĝo el la Armeo en 1971 mi vojaĝis plue preter la Fera Kurteno kaj vizitis esperantistojn, inkluzive de semajno en bela monta vilaĝo en Bulgario. Reveninte al Usono mi uzis esperanton por kontaktiĝi kun budhistoj en Azio, por mia sekva vojaĝo.

Post tri jaroj en Eŭropo, usona paroĥismo estis tro malalloga por mi kaj mi decidis foriri. Kiam mi alvenis al Aŭstralio mi reinteresiĝis pri pupludado, kaj finfine fariĝis pupludisto. Pro miaj jaroj en Italio mi povis reveni kaj studi italan pupludadon tie, malmultekoste loĝante ĉe amikoj.

Retrorigardante tiele, estas facile vidi rektan vojon gvidantan min al mia hodiaŭa vivo. Sed mi ne vidis ian vojon dum la vojaĝo.

[El *Telopeo*]



En Litovio, en julio, omaĝe al la 90a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en la urbo Vilnius, estis eldonita nova poŝtmarko.

KONU NIAJN MEMBROJN:

BIOGRAFIO DE AUDREY FELBY

DE KATJA STEELE



Audrey naskiĝis la 1an de novembro 1935 en Brixton, Londono, Britujo.

Inter 1941 kaj 1951 ŝi vizitadis kelkajn lernejojn, kaj en Danujo ŝi frekventis kurson pri tajpado. Ŝi estas membro de "Esperanto en Sudaŭstralio" kaj de AEA.

La patro de Audrey, Charles Perrin, tre juna iĝis maristo kaj partoprenis en la unua mondmilito. Poste li laboris kiel leterportisto. La patrino de Audrey nomiĝis Winifred Barbara. Audrey havas unu fratinon — Joan.

En Londono en 1956 ŝi konatiĝis kun Bob Felby, de kiu ŝi ne nur komencis lerni Esperanton, sed al kiu ŝi ankaŭ edziniĝis (en Danujo). Ili loĝis kelkajn jarojn en Britujo, kelkajn en Danujo kaj de 1974 en Aŭstralio. Audrey kaj Bob havas tri gefilojn. La plej aĝa el ili, Mark, loĝas en Brisbano. Allan, la dua filo, loĝas en Port Wakefield, kaj Linda, la plej juna el la gefratoj, loĝas en Salisbury. Audrey estas nun avino de 5 genepoj.

Krom sian denaskan anglan kaj krom esperanton Audrey parolas iomete

ankaŭ dane. Ŝia unua esperanto-lernolibro nomiĝis *A Practical Course in Esperanto*.

Audrey vigle prenis parton en la esperanto-vivo en Kopenhago kaj Frederikssund (Danujo), ĉeestis la danan kongreson en Roskilde, en 1968. En 1995 ŝi vojaĝis al UK en Tampere (Suomio), en 1997 ŝi helpis prepari la adelajdan UK-n. Ŝi kunpreparis la AEA-kongreson en 1982 en Adelajdo (la unuan ekde 1911) kaj ĉiun lokan somerkursaron (laste la ĉijaran). Eblas, ke iam ŝi verkos kaj publikigos sian biografion.



Audrey kaj Jiva

Kiajn profesiajn spertojn vi havas?

De 1951 mi laboris dum du jaroj en magazeno (Civil Service Stores), kiu situis sur la Strando en Londono. Inter 1953–56 mi laboris kiel Ŝtatoficisto en la Ministerio pri Sano en Londono. De 1967 mi laboris dum unu jaro en medikamentfabriko (Løven) en Kopenhago, en 1970 en kopenhaga vernisfabriko, kaj en 1972 mia lasta laborejo en Dan-

ujo estis la ĉokoladfabriko (Toms).

Post la alveno al Aŭstralio mi laboris en kartonfabriko (Hardy's) ĝis 1981.

Kiujn funkciojn vi plenumis en la Esperanto-movado?


Mi estis la adelajda libroagento de AEA (1982 ĝis 1990). Por la loka societo mi estis unu jaron bibliotekistino kaj kelkajn jarojn mi estis estrarino en Adelajdo.

Kia vi memoras vian alvenon al Aŭstralio?

Kiam ni eniris la landon, jam atendis nin en la flughaveno esperantistino, Thea van den Boogaard. Ŝi kun sia edzo kaj alia esperantisto, George Clarke, veturigis nin kaj montris al ni la belajn vidindaĵojn dum la unuaj tagoj de nia vivo ĉi tie. Dum tiu tempo la esperantistoj ne kunvenadis, sed Bob aktivigis ilin. En la komenco estis en la grupo nur

George kaj Thea, sed post iom da tempo venis ankaŭ aliaj. Mi memoras Bert Onn-on kaj Beryl Randells-on.

Ĉu vi havas krom esperanton iun alian hobion?



Audrey
kaj
Jiva

Antaŭe mi pentris iom, kudris kaj trikis. Mi ŝatis ankaŭ puzli, sed nun mi legas ĉiun tagon (anglalingvajn librojn), komputilumas kaj rigardas televidon.

Kiuj estas viaj grandaj revoj, planoj?

Mi nun estas kontenta, sed eble mi ŝatus vojaĝi. □

PRI LA SOMERLERNEJO

Pri “opinio de Terry Manley” p.29 de julio-aŭgusto 2005:

Ni de la Melburnaj Esperanto-Lernantoj diskutis tion kaj konsentis ke estos pli bone por ni havi somerkursaron je ĉiu dua jaro. Kompreneble ni anticipas ke dum la alia jaro haviĝos kongreso, kiel tiu en Kvinslando je januaro 2004.

Les Farkas, Johano kaj Elrae Adams, Betty kaj Henry Broadbent

Pri la “Opinio” de Terry Manley en la lasta *ESH*: Mi samopinias ke pli taŭgas altern-jaraj Kursaroj kaj Kongresoj. La problemo estas, ke malfacilas trovi invitantojn por organizi ilin. Konsekvence ni jam estas tiom ĝojaj, se iu urbo invitas nin, ke ni permes-as al la organizantoj mem decidi kiun kunvenformon elekti. Pluraj membroj preferis nur kongreson en 2006, sed la organizantoj decidis pri dusemajna kursaro.

Solvo de la problemo ne urĝas, ĉar por 2007 ni verŝajne havos la kursaron kaj kongreson kaj publikan simpozion en Indonezio.

Marcel Leereveld

GERDA MALAPERIS

DE JUNE PERKINS

Certe, se vi iam lernis esperanton, vi devas memori la libron verkitan de Claude Piron, kiun multaj progresantoj uzas por plibonigi sian scion de la lingvo. Nun, mi aŭdis pri propono fari ĝin kiel filmon. Mi anticipas ĝin avide.

Sed, nun, en miaj manoj, mi havas KD-n, registritan de fluparolantaj brazilanoj, de la tuta teksto de tiu libro. La ideo estas disvastigi la KD-n tra la mondo, por helpi nove bakitajn esperantistojn lerni kun ĝojo. Aŭskultante al la KD, oni aŭdos esperanton parolatan en tute natura maniero. La roluloj tre flue parolas esperanton, kaj iliaj voĉoj sonas tre agrablaj kun la vera esperanta akĉento.

Claude Piron afable permesis ke lia libro estu registrita en ĉi tiu maniero, sen ia rekompenco por si mem, escepte de la scio ke la registro helpos pli da studentoj en la estonteco ol antaŭe.

La brazilanoj, ankaŭ, ne deziras havi rekompencan por siaj laboroj. La roluloj estas dediĉitaj al la disvastigo de esperanto, kaj libere donis siajn talentojn. Por tiu kialo, ili donis al mi la permeson, por la Kvinlanda Federacio de Esperanto, produkti la KD-n en profesia maniero, kaj vendi ĝin tra Aŭstralio kaj Novzelando.

La Kvinlandan Federacion de Esperanto tre interesas havi la KD-n en la manoj de kiel eble plej multaj lernantoj,

por fari la lernadon de esperanto tiel plezuriga kiel eble. Pro ĉi tiu kialo la KD estos vendata je la prezo de \$10.00 (AŬD), plus la kosto por sendi ĝin. En Aŭstralio nun la sendkosto estas \$2.00, inkluzive de la poŝta skatolo. La sendkosto al Novzelando aldonos \$3.50 (AŬD) al la kosto de \$10.00 (AUD).



Se vi ŝatus havi KD-n, sendu la monon al la sekretario de la Esperanto-Federacio de Kvinlando, June Perkins, 48/110 Scrub Road, Carindale, Qld 4152. Mi petas, ke ĉekoj estu en la nomo de la Kvinlanda Federacio de Esperanto.

🦋 por ridigi vin 🦋

Instrua postulo

Dum nia lasta jarkunveno Johan v.d. Hoek proponis konfiski la elementajn lernejojn.

[*Esperanto-Nederland* feb 1996. — Kopiita el *La ondo de esperanto*]

KIO ESTAS HAJKO?

DE TONY PETERSON

Kio estas Hajko? Hajkoj estas 3-liniaj poemoj kiuj enhavas 17 silabojn. La formo estas origine de Japanio, sed Hajkoj havas sian propran magion ankaŭ alilingve!

Hajkoj enhavas ideojn, figurojn, asertojn, emociojn kaj eĉ enigmojn. Hajkoj parolas multe en nur kelkaj vortoj!

Strikte, hajkoj havas la silabordon 5-7-5. Tamen, vi povas verki hajkojn en 5-5-7 aŭ 7-5-5, ankaŭ.

Jen tri hajkoj en la tri silabordoj. La unuaj du hajkoj rilatas al la tria hajko.

LA 5-7-5 FORMO:

1.
la amaso kaj
la malluma ĉielo
vidis ke li suferas

2.
por lia kapo
krono de akraj dornoj
pardonas ilin

3.
silento...tiam,
la lumo de mil sunoj
de la ĉielo

La unua kaj dua komparas la morton de Kristo kun la atombombo ĉe Hiroŝimo.

LA 5-5-7 FORMO:

1.
sen ajna avert'
la ondo frapas

en momentoj, mil mortaj
2.

preskaŭ meznokto
kiam tragike
vidiĝis glacimonto

3.
subita muĝo
kaj laŭta bruo
nia unua sismo

La unua kaj dua komparas la tragan cunamon kaj Titanic-katastrofojn kun la sismo ĉi tie en Newcastle. la 7-5-5 formo:

Kaj fine, sen kompari unu kun la aliaj, tri hajkoj en la 7-5-5 formo:

1.
la arb' tremis kiam la
lasta folio
falas al la ter'

2.
jes...morgaŭ mi rigardos
Ĉu mi vidas vin?
Sed, ĉu vi zorgas?

3.
la maljuna virino
estas troa temp'
sonĝi...forgesu

Hajkoj estas simplaj kaj efikaj poemoj. Tamen, vi devos cerbumadi, ĉar vi havas la restriktion de la 17 silaboj, sed vi povas fari ĝin! Verku hajkon hodiaŭ ! □

🖱 • **interrete**


ĈU VIN INTERESAS ARTAĴOJ?

Du retejoj do verŝajne interesos vin.

La unua estas <http://free.x3.hu/ballajano/index.html>, kiu havas la galerion de la hungara skulptisto esperantista Johano Balla. Jen provekzemplo de liaj verkoj:



La dua estas <http://rivero.icpcn.com>, de mongola esperantisto Changhe Xue; ĉe tiu retadreso vi trovos aron da liaj pentraĵoj. Jen provekzemplo de liaj verkoj:



FILMORECENZO

JASON KAJ LA ARGONAŬTOJ

DE TONY PETERSON

Kun Todd Armstrong kiel Jason, Patrick Troughton kiel La Blinda Viro, Honor Blackman kiel Hera kaj Nancy Kovack kiel Medea.

Specialaj Efikoj: Ray Harryhausen. Reĝisoro: Don Chaffey. Muziko originala: Bernard Herrmann. 1963.



*Todd
Armstrong
kiel
Jason*

Ray Harryhausen estas fama inter amantoj de “Specialaj Efikoj”-filmoj, kaj rilate al *Jason Kaj La Argonaŭtoj*, li konsideris ĝin la kulmino de lia kariero. Kaj kiel prava li estis!

Li uzis teknikon nomitan “halt-mova fotografio” kiu donas vivon al mirigaj kreitaĵoj de antikva Greko mitologio, kaj faras ĉi tiun filmon ekscita sperto de komenco ĝis spektakla fino.

Jason estas la filo de Reĝo nomita Aeson, kiu estas uzurpita de sia ambicia frato, Pelias.

Kiam la patrino de Jason timas ke ŝia filo difektiĝos fare de Pelias, ŝi preĝas al Hera, Reĝino de la Dioj, ke ŝi helpu savi la knabon. Kun la permeso de sia edzo, Zeus, Hera helpas Jasonon kvinfoje tiel ke li povas postuli la tronon de sia patro.

Jason kolektas la plej fortan sportistojn kaj batalistojn en Grekujo, kaj velas al la insulo Kolĉido por trovi la magian Oran Lanon. Ĉi tiu Ora Lano donos al li plenan potencon kaj redonos

al li naskiĝrajton al la trono.

La filmo havas kelkajn mirindajn momentojn kaj tri el la plej bonaj estas la scenoj kiam la flugilhavantaj Harpioj turmentas la Blindan Viron; kiam Neptuno efikigas la “Kolizajn Rokojn” por protekti Jasonon kaj lian virojn kontraŭ droniĝo; kaj la scenoj kun Talos, la monstra bronza statuo kiu gardas kripton kiu enhavas rarajn juvelojn.

Sed certe, la suverenaj momentoj en la filmo okazas kiam Jason batalas la skeletojn kiuj leviĝis el la dentoj de la Hidro kiun Jason mortigis. Estas kelkaj mirigaj minutoj kiam ili aperas, kaj kiam Jason kaj liaj viroj batalas ilin kaj la skeleto-armeo falas de la klifo malsupren en la maron. Post 1963 filmoj mul-



*Minac-
antaj
skeletoj*

te ŝanĝiĝis, sed bedaŭrinde, la “Specialaj Efektoj”-filmoj kiujn ni vidas nuntempe (kiaj la serioj *Stel-Bataloj* kaj *Lordo de la Ringoj*) ne havas la ĉarmon kiun ili havas ĉi tie, eĉ kvankam, teknike, la efektoj hodiaŭ estas “pli bonaj”. →

FILM REVIEW

JASON AND THE ARGONAUTS

REVIEWED BY TONY PETERSON

With Todd Armstrong as Jason, Patrick Troughton as the blind man, Honor Blackman as Hera and Nancy Kovack as Medea.

Special Effects: Ray Harryhausen. Director: Don Chaffey. Original Music: Bernard Herrmann. 1963.

Ray Harryhausen is famous to lovers of "Special Effects" films, and he considered *Jason And The Argonauts* to be the culmination of his career. And how right he was!

He used a technique called "stop-motion photography" that gave life to fantastic creatures from ancient Greek mythology, making this film an exciting experience from start to spectacular finish!

Jason is the son of a King named Aeson, who is usurped by his ambitious brother, Pelias. When Jason's mother fears that her son will be harmed by Pelias, she prays to Hera, Queen of the Gods, to help save the boy. With the permission of her husband, Zeus, Hera helps Jason on five occasions until he can claim his father's throne.



Batalado

Jason gathers the strongest athletes and warriors in all Greece, and sails to the island of Colchis to find the magical Golden Fleece. This Golden Fleece will give him ultimate power and his birth-right to the throne.

The film has some wonderful moments and three of the best are the scenes with the winged Harpies who taunt a blind man; Neptune rising from the ocean to let Jason and his men sail through the "Crashing Rocks" to protect Jason and his men from drowning; and the scenes with Talos, the monstrous bronze statue who guards a crypt that contains precious jewels.




Armeo de skele-

But surely, the supreme moments in the film occur when Jason fights the skeletons that rise from the teeth of the Hydra Jason slays. It's a fantastic few minutes when they appear and when Jason and his men fight them and the skeleton army falls from the cliff and into the ocean below.

Since 1963, films have changed very much, but unfortunately, the Special Effects films we see nowadays (like the Star Wars and Lord Of The Rings series) really don't have the charm that they have here, even if, technically, the effects today are "better". →

Fine, malsimile al la plej multe da filmoj de ĉi tiu tipo, *Jason Kaj La Argonaŭtoj* ne havis sekvaĵon, kaj laŭ ĉi tiu recenzisto estas terure domaĝe, ĉar ĉi tiu estas filmo kiu vere meritis tion. Ĉi tiu estas bonega filmo, se vi amas grekan mitologion ...aŭ ajnan mitologion!

Finally, unlike most films of this type, *Jason And The Argonauts* did not have a sequel, and for this reviewer that's a dreadful pity, because this is one of the few films that truly deserved one. This is a great film if you're into Greek mythology...or any mythology! □



RADIO 3ZZZ

Nia aŭstralia esperantolingva radio-programo
Ĉiam aŭdebla per Interreto

Kvankam la nombro da esperantolingvaj radioprogramoj aŭskulteblaj per Interreto ebligas informiĝi pri la vidpunktoj kaj opinioj de personoj en multaj landoj — kaj ankaŭ aŭskulti (vole/nevole) la politikajn asertojn de iuj landoj — ne scias ĉiuj esperantistoj ke nia propra aŭstralia esperantolingva radioprogramo unuhora aŭskulteblas ĉiam ajn dum la semajno, ĉe www.3zzz.com.au. La vario de la enhavo — instruado, muziko, prelegoj, komentoj, intervjuoj, kulturajoj — faras ĝin interesa por ĉiuj aŭskultantoj. Kaj la lingvonivelo estas alta. Ĉiu komputilo konektita al Interreto kapablas aŭskultigi la programon, kiu estas nova ĉiun lundan posttagmezon. Simpla modemo sufiĉas — ne necesas “broadband” — plus la senpaga komputiloprogramo RealPlayer (elŝutebla ĉe www.real.com).

Krozante la mondon, ne forgesu vian propran ĉehejman esperantolandeton!

• interrete

• <http://www.edukado.net/> havas novan aspekton, kaj estas multe pli facile uz-ebla post multaj rearanĝoj de la enhavo. Laŭ la opinio de via redaktoro, ĉi tiu retpaĝo estas unu el la plej utilaj kaj facile uzablaj sitoj por trovi informojn, helpon, kaj materialon por la lernado de esperanto kaj por la instruado de esperanto. Mi varme rekomendas ĝin al ĉiu instruisto kaj lernanto de esperanto.

• **La retadreso de AEA**, la libroservo, *ESK*, la oficistoj de AEA kc.: AEA nun havas ĝeneralan retadreson:

[---]@esperanto.org.au

anstataŭ [---] estu la adresato, ekz.:

libroservo@esperanto.org.au,

kasisto@esperanto.org.au, eĉ

esk@esperanto.org.au — se vi trovas tiun adreson pli facile memorebla.

DIVERSAJ/VARIOUS

• **Yumeiho-Centro en Tokjo** devas sciigi al vi treege malĝojigan kaj gravan nov-aĵon.

En la lasta parto de marto, nia grandega kreinto de Yumeiho, Prezidanto de Monda Yumeiho-Societo, Prezidanto de Yumeiho-Centro, Majstro Saionji Masayuki forpasis je la aĝo 61jara.

Tio estis treege subita okazintaĵo por ni, membroj de Yumeiho-Centro kaj ni tute ne povis tuj informi tion al vi ĉiuj.

Mi elkore pardonpetas al vi ĉiuj.

Disvastigi Yumeihon al homoj suferantaj pro malsano en la mondo estis revo de grandega majstro Saionji Masayuki.

Do, ni postlasitaj membroj de Yumeiho-Centro pli multe laboros kune kun vi, ge-yumeihoistoj en la mondo, por realigi la revon de grandega majstro

Saionji Masayuki.

Sincere via,

Reprezentanto de Yumeiho Centro en Tokio, Watanabe Tatsuhiro.

(Tradukita de Watanabe Sachio)

• **I would like to invite you** to hold a beach holiday near the river Danube, close to Vienna, Austria. The holiday includes breakfast, dance lessons, cycling, and visits to the city of Vienna, and costs 15,- Euro per person.

For further information, see www.esperantoparadizo.com or contact us at:

esperantoparadizo@aon.at


Please write in English, German or Esperanto.

Please feel free to inform other people about Esperanto-Paradizo. □

HEJMPAĜO DE VIA REDAKTORO

Ĉu vi deziras informiĝi pri kelkaj el la sekretoj de la vivo de via redaktoro — el kie li venis, kiel aspektas li kaj lia familio, kaj diversaj aliaj neveresekretaĵoj pri li? Nun vi povas, per via komputilo, iri al www.broadribb.esperanto.org.au/ kaj legi pli ol iam vi volis scii pri li! Kaj se vi ame memoras esti leginta la verkojn pri Doktoro Dolittle de Hugh Lofting kiam vi estis infano, vi trovos ĉe tiu retejo ankaŭ tradukojn de kelkaj el tiuj porinfanaj romanoj—eĉ kun bildoj!—en pdf-formo. [*Kio?* nu pdf-o estas speco de komputila teksto kiu reproduktas ekzakte la aspekton kaj enhavon de presita libro. Ĉiu komputilo povas legi pdf-ojn, per la senpaga programo *Adobe Reader* — ankaŭ nomata *Adobe Acrobat Reader* — kiun vi povas *senpage* elŝuti ĉe [www.adobe.com/.](http://www.adobe.com/)]. Se vi volos, vi povos eĉ presi libro(j)n el tiu serio per via komputila presilo, kvankam vi bezonos multe da papero kaj da inko se vi faros tion.

LA BRUSELA BUBO



NUN HAVEBLAS

La libroservo ĵus ricevis la bildstrian libron *La Brusela Bubo*. Ĝi estas tre belaspekta kolora libro simila al la Tinĉjo- (Tintin) libroj kaj Asteriks-libroj. La aŭtoro de la libro estas Willy Vandersteen. Libroj de li ankaŭ eldoniĝis en la angla. La bildstrioj temas pri aventuroj de 2 infanoj: Cisko kaj Vinjo. En la angla eldono la infanoj nomiĝas Bob kaj Bobette. La libroservo de AEA havas nun plurajn ekzemplerojn. Unu ekzemplero kostas \$13.85. AEA membroj raj-tas 5% rabaton. Bonvolu aldoni \$1.40 por sendokostoj. La retadreso de la libroservo estas libroser@ans.com.au.

DE TREVOR STEELE

ĴUS APERIS




DIVERSKOLORE *Prozaĵoj*

27 nelongaj artikoloj pri la pensoj kaj spertoj de la aŭtoro.

Eldonis Sezonoj (Kaliningrado, Rusio) 2005.
109p.

Prezo: \$20 +
afranko.



LA FOTOALBUMO *volumo 2*

La dua parto de la "aŭtobiografia" verko de la aŭtoro, kun liaj pensoj kaj spertoj de la vivo.

Eldonis Internacia Esperanto-Muzeo (Vieno) 2005.

165paĝoj.

Prezo: \$25 +
afranko.

Aĉeteblaj ĉe Trevor Steele, (52 Exmouth Road, Glanville SA 5015).
trevor_steele@myway.com

RECENZOJ APEROS EN LA VENONTA NUMERO DE *ENK*

PRI LA PRETIGADO DE ESK

DE LA REDAKTORO

Montriĝis ke ekzistas miskomprenoj pri la ĝusta dato sendi kontribuojn por aperigo en *EŜK*. Mi deziras do klarigi precize pri la pretigo de la gazeto:

La “limdato” estas la dato kiam plej malfrue devas atingi min teksto por *EŜK*. Kutime tiu dato estas la 15a de la monato antaŭ la monatotado de *EŜK*. Ekzemple, por la novembro-decembra numero tekstoj devas plejmalfrue atingi min la 15an de oktobro.

Ĉar York (la vilaĝo en kiu mi loĝas) situas 100 kilometrojn oriente de Perto, oni devas anticipi ke sendo per poŝto necesigos du ekstrajn tagojn pli ol se oni sendus al Perto.

KONTAKTO KUN MI: ORDINARA POŝTO

Poŝtaĵoj por York unue iras al la poŝtocentro en Perto. El tie la poŝtocentro transsendas ilin per kamiono norden, al la urbeto Northam.

La poŝtocentro en Northam siavice transsendas ilin frue la sekvan matenon per kamiono orienten al York. Aŭstralia Poŝto liveras al York el Northam nur unufoje en la tago. Tamen, sabate kaj dimanĉe Aŭstralia Poŝto ne transsendas al York, do plejofte poŝtaĵo restas en la poŝtocentro de Northam dum unu, sed kelkafoje du tagoj.

PER INTERRETO

Mi kontaktas la interretan isp-on (Optus net.com.au) kutime en la posttagmezo ĉiutage, kelkfoje ankaŭ en la mateno. Pro la alta kosto de “Broad-

band”, mi havas nur ordinaran telefonligon al Interreto, do mi ne ricevas retmesaĝojn ĉiuajntempe.

PRETIGO DE LA TEKSTOJ

Tuj post la finpretigo de la antaŭa numero, mi komencas pretigi la sekvan numeron de *EŜK*. Ĉar multa tempo estas bezona por redakti, komposti, kaj aranĝi tekstojn por *EŜK*, mi kutime redaktas kaj kompostas tekston tuj post ĝia alveno, kaj provizore lokigas ĝin en la preparata *EŜK*. Tiel je la limdato nur necesas tralegi la tiutagajn poŝtaĵojn kaj retmesaĝojn, ĉar la tuta numero de *EŜK* estas jam preskaŭ preta por la finpretigo.

Plejofte venas tro da artikoloj por iu specifa numero. Se urĝa teksto atingas min vere lastamomente, necesas rearanĝi la enhavon de la gazeto, kio povas esti kompleksa tasko.

KIO ESTAS LIMDATO

Limdato estas la lasta dato por akcepto de teksto por la koncerna numero. Evidente, ju pli frue oni sendas tekston al mi, des pli frue mi povas komposti, lokigi, kaj aranĝi ĝin en *EŜK*.

Kontraste, se teksto atingas min nur je la limdato, necesas enŝovi ĝin en jam preskaŭ tutpretan gazeton, se ĝi klare vere estas urĝa; aŭ, se ne, prokrasti ĝin ĝis la sekva numero.

LA FINA PRETIGO

La fina finpretigo okazas en la mateno tuj sekvanta la limdaton. Nur eblas korekti komposterarojn tiam

(post provlegado fare de Vera Payne), ĉar mi tiutempe pdf-igas la tutan *ENK*-numeron.

Klarigo por nekomputilistoj: pdf-o (portebla dokumento - formato) estas libro, gazeto, aŭ aliaj eldonaĵo, pretigita per komputio tiel ke ĝi povas esti rekte presita per presilo, kaj ankaŭ sur la ekrano de komputilo aspektas kiel vera libro. Ĝi estas preciza prezento per komputilo de la presota eldonaĵo.

Macintosh-komputiloj, kian uzas via redaktoro, kapablas mem produkti pdf-ojn el preparita teksto. Aliaj komputiloj povas fari tion uzante specialan programon nomatan *Adobe Acrobat*.

PRESIGO KAJ DISSENDO

La pdf-o de *ENK* sendiĝas al la presisto ĉe la Universitato Monash, en Melbourne. Depende de kiom da prestaskoj restas kompletigendaj tie, *ENK* enviĝas por sia loko en la presmaŝinoj.

Post la presado de la ekzempleroj, ilin prenas nia sendisto Margaret Inglis, kiu surmetas la adresetiketojn, ilin enkovertigas, kaj portas al la poŝtoŭicejo por livero al la abonantoj.

Ensume la postpretigaj aferoj postulas proksimume du semajnojn, tiel ke *ENK* povas atingi la abonantojn frue en la monato sekvanta la limdaton. □

NEKROLOGO

DON PESCOD 1921-2005

VERKIS SVETISLAV KANAĈKI

Forpasis nia fidela esperantisto kaj bona organizanto de esperanto-aranĝoj dum longaj jaroj de sia vivo, kiel membro de la Orienta-Malverno-klubo. Li estis diverstempe Prezidanto, alfoje sekretario, alfoje kasisto. Kaj preskaŭ ĉiam li estis organizanto de esperantaj eventoj, kiuj tiutempe estis pli oftaj. Por L.L. Zamenhofaj tagoj li ĉiam organizis kune kun la Oakleigh-grupo dramojn kaj kantojn; kaj speciale kiam kvakeraj seminarioj okazadis en la kvakera domo. Ni tre bedaŭras kiam ni perdas unu el niaj membroj. Lia nomo estas Donald Pescod, li naskiĝis la 31an de januaro 1921, kaj li forpasis la 4an de julio 2005. Li havis 84 jarojn.

Malmultaj el niaj nunaj membroj konis lin, kaj malmultaj el ni restis por adiaŭ lin en lia lasta surtera okazo de lia vivo. Ĉeestis la specialan entombigan ceremonion nur tri personoj: Marcel kaj Alida Leereveld, kaj Svetislav Kanaĉki. Ili korskue kaj kun larmoj parolis en la anglikana preĝejo kaj adiaŭis lin en la nomo de niaj nunaj kaj forpasintaj samideanoj. Kara Don — Dio benu vin pro via bona laboro surtera.

MALONGA KLARIGETO

DE MARCEL LEEREVELD



Por ke niaj legantoj ne misinform-atu, estas necesa klarigi la interrompojn, sen mia peto faritajn de la bonvola redaktisto, en mia artikolo “For the Beginner”

(paĝe 17, *ĜJK* 76). La klarigoj necesas ankaŭ por ne doni al kontraŭ-esperantistaj lingvistoj la armilon, deklari ke eĉ la elito de la esperantistaro mem ne komprenas sian lingvon. Estas do nia devo zorgi, ke la uzo ante esperanton kaj la klarigo ante esperanton estu ekzemplaj kaj estu nekritikeblaj laŭ la specialaj gramatikaj reguloj de la lingvo. Ĉiu lingvo havas siajn regulojn, sed en esperanto ni promesas kaj promesados, ke la reguloj estas konsekvencaj kaj ne havas esceptojn. Tio estas parto de la spirito de nia lingvo.

Kompreni kaj klarigi la gramatikan spiriton de esperanto ne estas facila. Ĝi estas nefacila, ĉar tia spirito de logikeco kaj konsekvenceco per si mem ne ekzistas en etnaj lingvoj. En etnaj lingvoj oni ne serĉas, kiel uzi la lingvon logike, sed oni serĉas trovi logikecan klarigon de nelogikaj. La dueco estas speco de deduktado (esperanta) kontraŭ induktado (etna). La klarigoj kaj reguloj de etnaj lingvoj ne ekzistas por igi la lingvon komprenebla kaj uzebla (tion faras la parolantoj mem). La klarigoj kaj reguloj de esperanto ekzistas por zorgi, ke la lingvo estu nemiskomprenebla kaj fidebla. Tio estas la speciala spirito de la esperanta gramatiko. Por esti fidebla, ĝi

devas esti logika kaj sen esceptoj. Etnaj lingvoj povas permesi al si esti tre mallogikaj kaj havi multajn esceptojn, ĉar ili uzatas kaj kreas nur de la parolantoj mem. Esperanto uzatas kaj kreas (ĝis la “fina venko”) de parolantoj de multaj kaj malsamaj lingvoj etnaj.

Por ni esperantistoj do gravas daŭre konsideri la spiriton de nia lingvo, kiam ni uzas kaj klarigas ĝin. Bedaŭrinde nek Zamenhof mem nek la postaj esperantistoj bone komprenis tiun specialan spiriton de esperanto. Li kaj ili nur konis, aŭ surbazigis, la spiritojn de la eŭropaj (kaj eble hebrea) lingvoj, kies klarigojn ili uzis, en antaŭa tempo uzi devis, por esperanto. La rezulto estas kontraŭdiroj kaj nelogikaj bazitaj sur eŭropeca lingvoklarigado. Bedaŭrinde ankaŭ la Redaktisto de *ĜJK* juĝas la gramatikon de esperanto laŭ tiu ortodoksa lingvismo. Ekzemple li kaj Zamenhof miskomprenas la funkciojn kaj la signifojn de -igi kaj -iĝi, kvazaŭ ili estas, eble kiel en la hebrea, “a contrasting pair”. En esperanto ili estas tio nur ŝajne: en “sidiĝi” troviĝas nur unu ago dum en “sidigi” troviĝas du agoj, kaj “-iĝi” hazarde faras transitivajn verbojn transitivaj, dum “-igi” hazarde faras ne-transitivajn verbojn duoble transitivaj (ĉar reprezentante du agojn). Do tute ne temas en esperanto pri “kontrasta paro”: “-igi” aldonas duan agon, sed “-iĝi” ne forprenas la nuran agon, nek estas la kontraŭo de “sidigi” (kies kontraŭo estas aŭ “lasi sidi” aŭ “sidigati”).

Daŭre la Redaktisto donas la impreson, kvazaŭ ni ne rajtas uzi laŭregule kunmetitajn vortojn, se li mem neniam

renkontis ilin, aŭ kvazaŭ ni ne rajtas uzi la gramatikajn regulojn por pliriĉigi esperanton, aŭ kvazaŭ ni devas klarigi la spiriton de esperanto laŭ la malmoderna eŭropeca kompreno, kiu estis ankaŭ tiu de Zamenhof.

Ekzemple pri la Pasiva Voĉo li mencias Zamenhof, kiu ne komprenis ke “amatas” estas bazita ne nur la egaligo ante “-is” al “estis”, sed sur la reduktio ante la signifon de “-ati”. Do estis sensenca mencii tiun Zamenhof’an klarigon, kiu ne klarigas “amatis” ktp, sed “amatas” kaj “amitas” ktp., kiuj por Zamenhof ne signifas la simplan Pasivon sed la ŝanĝon ante “estas/is/os” al “-as/is/os”. Same kiel la Redaktisto iam uzis “konstruatas” por “estus konstruanta”, cetere signife neebla kunmeto. Krome estis Zamenhof mem, kiu reduktis signifojn en specifaj kazoj, ekz. ke “falinto” estas nur persono, kaj ke “estas trinkata” estas nur Pasivo kaj ne nefiniteco (= -ata normale). Tiu regulo povas kaj devas uzati ankaŭ ĉe la Pasivo. “Devas”, ĉar sen sufikso tiu Voĉo estus escepto al la reguloj, ke la Voĉoj havas sian propran sufikson, kaj ke la Voĉoj indikas nocion de nur unu ago. Ĉu oni uzas nur -iti aŭ nur -ati aŭ nur -oti por tia reduktita signifo (= sen temp- nek aspektindiko) estas negrava, kvankam

-ati estas iom preferinda (estas pli facila forpreni la ideon de nefiniteco ol la ideojn de finiteco kaj nejameco). Ke la Akademio ne konsideris la problemon (ke Zamenhof imitis la eŭropajn pasivajn anstataŭ uzi esperantan Pasivon), montras ĝian nekompetentecon.

Pri la Mediala Voĉo: Laŭ la esperanta genio, en esperanto ne povas ekzisti vortoj kun du malsamaj kaj kontraŭaj signifoj. Se la redaktisto opinias (kiel li faras), ke “li sidiĝis” signifas ke li “vole faris tiun agon”, ankaŭ “li malsaniĝis” kaj “li sufokiĝis” devas signifi, ke li “vole faris tiun agon”, ĉar ekzistas neniam indiko pri tio ol “-iĝ-”. Sed se la du lastaj signifas la esperantan Medialon (kiel mi opinias), t.e. sen la volo de la nova subjekto “li”, en tiu kazo ankaŭ “li sidiĝis” kaj “li paliĝis” kaj “li kuŝiĝis” signifas, ke la ago okazis sen la volo de la nova subjekto “li”. Same kiel ĉe “la leciono komenciĝis” kaj “la leciono trolongiĝas”, kie la leciono faras la agojn “komenciĝi” kaj “trolongiĝi” pasive sen mencio de la antaŭa aganto/iniciatinto. Ke Zamenhof ne certis pri tio, estas pardoninta. Ke preskaŭ la tuto de la elito de la esperantologaro plu klarigas la gramatikon laŭ la eŭropa tradicio kaj ne komprenas la Medialon, estas senesperiga. □

• recenzas marcel leereveld

Nicole Else: *Mummy, Why Can't We All Speak the Same Language?* Published by the AEA Libroservo. Paperback. 40 large size pages. Price: ±\$6. Overall evaluation: 🍷🍷🍷🍷.

This booklet is meant for children of Elementary School age, and for school use. It is entirely in English, and gives in fifteen lessons (“Parts”) an overview of the differences in languages, and an insight into the problems of translating

from one language to another. The last two chapters are devoted to Esperanto, but the writer does not push Esperanto; she simply mentions favourable facts and uses terms like “I think” and “my opinion”. It is therefore for non-

Esperantists much more palatable and convincing that our usual propaganda.

Each lesson is printed on the left hand page, whereas on each right hand page are multiple-choice questions about the contents, to be answered by the child. These questions are graded, and become harder as the reader proceeds through the book. The need for gradually more thinking has been worked out admirably. The answers to the quiz questions are at the end of the book.

The book will be useful for the following:

- 1) Primary schools, as an introduction to foreign language learning, in the last years.

- 2) Similarly in schools in which Esperanto is taught.


- 3) At home for children aged 8-11 years.

Even grown-ups may like to learn something (very basic, though) about the languages of the world.

The author has a post-graduate diploma in translation from the Sorbonne University (Paris).

I can highly recommend the book. What about each Esperantist donating a copy to the Head of a Primary School (especially where no foreign language is taught), together with some information about Esperanto's propaedeutic value?

MUMMY, WHY CAN'T WE ALL SPEAK THE SAME LANGUAGE?



The book has 15 parts:

Languages of the world

Similarities between languages

How languages differ: by their grammar

How languages differ: by their alphabet

Chinese writing

Japanese writing

How to write numbers in different languages

Different ways of writing

English: Braille, Morse, shorthand

Could English spelling be

simplified and written phonetically

Languages in Australia

Why is translating so hard

The need for a common language

Wouldn't it be nice if everyone would learn English, at least as a second

language

What is Esperanto

Why is Esperanto easier to learn

\$5.95+postage. 5% discount for AEA members. Order from the AEA libroservo.

• interrete

• **Ĉu vi ludas ŝakon?** Se jes, ĉu vi deziras ludi ŝakon kun aliaj esperantistoj, per la Reto? Do kontaktu *Esperanto Ŝak-Ligo Internacian*, kaj sendu aliĝmesaĝon al:

esperanta-sxak-ligo-internaciasubscribe@yahoo.com.

• **Maniac Mansion deluxe en Esperanto!** Klasika komputila ludo *por IBM-kongruaj komputiloj*.

Antaŭ iom pli ol 15 jaroj, estis lanĉita la ludo Maniac Mansion (“freneza domo”), kiu popularigis novan ludstilon kaj arigis legion da fanoj ĉirkaŭ la mondo. Pasintjare, internacia volontula skipo relanĉis la ludon, nun kun pli ellaborita grafiko kaj rulebla en modernaj komputiloj, “Maniac Mansion Deluxe”. Intertempe pli ol 400 000 personoj jam elŝutis la novan version senpagan, kiu estas ade tradukata en novajn lingvojn: nun, ĝi estas disponebla ankaŭ en espe-ranto!

En MM, la ludanto interagigas kun roluloj kaj objektoj, kadre de pluraj malgrandaj sinsekvaj enigmoj, kiuj devas esti kohere solvitaj cele al la fina tasko: savi la koramikinon de la ĉefa rolulo, enkarcerigitan de freneza sciencisto. Oni gvidas skipon de tri studentoj tra lia domo, interagante per komandoj (“prenu”, “malfermu”, “fermu”, “puŝu”, ktp) kaj dialogoj, kiuj donas indikojn pri la solvo de la enigmoj. Vi eltrovos ke ĉiu el la sep elekteblaj junuloj havas specialajn lertojn, talentojn kaj malfortojn, kaj ĉiu el la frenezaj loĝantoj de la domo havas celojn kaj dezirojn kiuj povos helpi aŭ bloki vian skipon, depende de kiel vi rilatas al ili. La historio — kaj via alirmaniero por plenumi la

celon — estos malsamaj laŭ la knab-oj kiujn vi elektas kaj kiel vi interagas kun la personoj kaj aĵoj en la domo... Longgaj horoj da alloga cerbumado atendas vin! ;-)

Pro la ampleksa teksta interagado sur grafika interfacio, la ludo estas plaĉa rimedo por praktiki lingvajn talentojn. Ĝi estas bona amuzaĵo kaj por progresintoj, kaj por progresantoj; la grafika interagado ebligas ke eĉ komencantoj ĝuu la ludon, samtempe ĉerpante sufiĉe ampleksan vortprovizon.

La paĝaro de la skipo, "LucasFan Games", troviĝas ĉe:

http://people.freenet.de/lucasfangames/maniac/index_eng.htm. Iru al "Our Games", kaj poste elektu "Download" sub "Maniac Mansion Deluxe".

Alternativa vojo por elŝuto de la ludo:

<http://www.filefront.com/?filepath=/Advventureserver/fanadventures/mmd14setup.exe>.

Se vi eventuale ricevas la ligilojn fuŝitaj: ili ankaŭ estas troveblaj ĉe mia blogejo/fotejo, krom kelkaj ekranfotoj de la ludo: <http://jimes.multiply.com>.

• **ENIGMO estas ludo** kiu permesos al vi kontroli vian ĝeneralan kulturon kaj vian konon de Esperanto. Ĝi estas liverata kun dudeko da demandoj antaŭinstalataj sed eblas aldoni viajn proprajn demandojn.

Enigmo funkcias sub Windows 98, Me, 2000 kaj XP. Rekta ligo por elsutoj:

<http://perso.wanadoo.fr/la-vortaro/Enigmo1-0.exe>

[Laŭ *Ret-info*]

RAPORTO EL INDONEZIO

DE HAZAIRIN R. JUNEP

S-ro Hazairin en Indonezio multe laboras por esperanto. Li ankaŭ havas aliajn ideal-ojn. Unu el tiuj estas helpi homojn kiuj urĝe bezonas helpon, kaj li tre aktivis helpi viktimojn de la ĉijara granda vulkanerupcia ondegaro en Aĉeho. Li kolektis monon por tio ankaŭ ĉe la aŭstraliaj esperantistoj, kaj sendis al ni raporton pri lia uzo de la pli ol \$1000 por tiu celo donacitajn de aŭstralianoj. Pleje helpis lin pri tio Dianne Lukes.

RAPORTO PRI LA HUMANA HELPO

Elspezis por la helpo al la viktimoj de cunamo en Aĉeho:

Nro. /dato	pro	pagado al	sumo
001/07.01.05	Kunordiganto de volontuloj	Tuwarji (nia kuriero)	Rp. 1000.000,-
002/07.01.05	6 studentoj de Aceh en Purwokerto, Centra Javo	Metty (volontulino)	Rp. 600.000,-
003/09.01.05	Kunordiganto de volontuloj	Irfan (Kunordiganto de volontuloj)	Rp. 1.500.000,-
004/21.01.05	Volontulino	Anna B (volontulino)	Rp. 200.000,-
005/21.01.05	Volontulino	Sumarah (kunordiganto de grupo de junaj islamanoj)	Rp. 200.000,-
006/24.01.05	Volontulino	Metty (volontulino 1a periodo)	Rp. 1000.000,-
007/25.01.05	Aranĝado de dokumentoj ĉe dogano	Tuwarji (kuriero)	Rp. 100.000,-
008/22.02.05	Volontulo	Tuwarji (volontulo)	Rp. 1000.000,-
009/07.03.05	Volontulino	Metty (volontulino 2a periodo)	Rp. 1000.000,-
LA SUMO ĜENERALA: Rp. 6.600.000			

PRI LA ESPERANTO-AGADO :

Mi daŭrigas revizii la libreton kaj nun jam ni havas belan aspekton de la kurso interrete danke al S-ino Debra McCarney kaj S-ino Dianne Lukes. Mi devas ŝanĝi ion en la parto de konversaciaj frazoj Indonezia-

Esperanto, poste mi volas eldoni ĝin en Jogjakarto.

Dum januaro ĝis majo mi ricevis 3 leterojn: 2 de la veteranoj kiuj lernis nian lingvon en 1958 sed nur unu povas uzi ĝin,

kaj unu de junulino en Lombok, kiu lernas esperanton per mia libreto kaj ŝi povas skribi leteron al mi esperantlingve. Antaŭe estis alia sed li malaperis. Bedaŭrinde, neniu el ili volas partopreni en la movado. Mi certe malsukcesas montri ilin ke la lingvo internacia estas grava. Nun ĉiu volas lerni ion por labori aŭ por kariero. Ankaŭ mi ne povas certigi aliajn ke la lingvo esperanto vivas kaj kreskas, kaj ke oni povas lerni ĝin kiel aliajn lingvojn ĉe universitato, ĉar neniu el la universitatoj havas eĉ unu libron. Escepte de kopioj de manifesto Praga...

Mi mem havas nek paperon nek atestilon kiu montras ke mi estas esperantisto, krom mia karto (vizitkarto), kaj kiam iu legas ĝin, malofte okazas demando, pri kio estas esperanto.

Mi agas jam pli ol unu jaron kaj mi parolis al multaj homoj gravaj, ekzemple la prezidanto de Gvidistoj de Indonezio, direktoro de la Akademio de fremdaj lingvoj de Jogjakarto (nun Dekano de la Fakultato de Kulturo, Universitato de Teknologio), mi donis al li mian libreton kaj li estis tre entuziasma sed li malĝoje diris al mi ke mi devas sendi proponon kun dokumentoj por prelegi ĉe lia universitato... ho ve! mi ne havas ĝin.

Mi paŭzis skribi mian vortaron, mi ĵus finis la *l*-parton kaj komencis la *m*-parton, sed la grandaj formikoj detruis miajn valorajn librojn kaj tre rarajn poŝtmarkojn kaj

ankaŭ miajn atestilojn. Do mi decidis konstrui oficejon/bibliotekon por konservi miajn valorajn librojn, inter ili pli ol 100 vortaroj kaj enciklopedioj en preskaŭ 40 lingvoj. Post 2 monatoj mi finis ĝin, mi laboris kun miaj amikoj kaj unu ĉarpentisto kaj unu brikisto.

AEA promesis helpi min por mia esperanta agado, kaj mi estas tre dankema, sed mi ne volas almozpeti la monon. Mi preferus fari ĉion kion mi povas; eĉ se mi bezonos 100 jarojn, mi daŭrigos kaj sukcesos.

Mi jam ricevis Aŭ\$2000 kaj elspezis ĝin por komputilo. Mi jam sendis la kvitancojn al S-ro Marcel Leerveld.

Mi meditas, ĉiutage. Mi volis disvastigi amon kaj harmonion. Post multaj jaroj mi finfine renkontis mian ilon. Esperanto estas mia espero. Kiam mi parolas ĝin mi sentas kaj pensas kiel civitano de la mondo, ĉar la majstro kreis ĝin por ke ni parolu unu al la alia, por kompreni pli bone la aliajn kulturajn, kredojn ktp. En mallonga vorto "amo:".

Hazairin R. Junep

Centro de Esperantaj Studoj

Pesangrahan #2, Pakem Yogyakarta 55582, Indonezio

[Ĉi tio estas ekstrakto el raporto multe tro longa por aperigo en *ESK*. La tuta artikolo estas havebla ĉe la redaktoro, se leganto ĝin deziras.]

• **deziras korespondi**

Tri hindiaj lernantinoj de Esperanto en la urbo Bangaloro volas korespondi (papere ne rete) kun pli malpli samaĝaj esperantistoj. Ili estas 13-jaraj.

Sendu viajn proponojn kun adresoj

por papera poŝto al:

Venkatesh Reddy

<esperovr@yahoo.co.in>, aŭ al:

Gabriele Corsetti

<gabriele_corsetti@hotmail.com>

NOTICOJ PRI LA NITOBE-SIMPOZIO EN VILNO EN AŬGUSTO 2005

DE TREVOR STEELE

Tuj post la UK en Vilno okazis la Nitobe-Simpozio en la litova parlamentejo. Financis ĝin Esperantic Studies Foundation, kaj la ĉefaj aranĝantoj estis Humphrey Tonkin kaj Mark Fettes. Nitobe estis japana diplomato, kiu agadis favore al esperanto ĉe la Ligo de Nacioj en la 1920-aj jaroj.

La simpozio ĉi-jara fokusis pri la novaj landoj aliĝintaj al la Eŭropa Unio kaj la lingvaj problemoj estigitaj de tiuj aliĝoj. Oni aŭdis paroladetojn de reprezentantoj de Polio, Estonio, Latvio, Litovio, Hungario, Ĉeĥio, Slovakio, Slovenio, kaj la greka parto de Cipro (mankis maltano). Krome ĉeestis grupo da homoj tre eminentaj sur la kampo de lingvoplanado kaj –esplorado. Kompletigis la anaron (kiu variis de 60 ĝis 80) esperantistoj kaj seshoma interpretista teamo (mia tasko estis interpreti el la germana kaj esperanto en la anglan).

NOVAJ EU-LANDOJ

EU, almenaŭ ekde la Traktato de Maastricht (1992), solene garantias la egalecon de ĉiuj naciaj lingvoj de la membro-ŝtatoj, sed estas nenia sekreto, ke en la vera — nesimbola — mondo de "laborlingvoj", malantaŭ la kulisoj, sen ajna debato, la EU-instancoj transiras al uzo de tri lingvoj (la angla, franca, kaj germana), aŭ du lingvoj (la angla kaj franca), kaj nun pli kaj pli al "nur-angla Eŭropo". Tiu tendenco havas plurajn sekvojn rilate dungon de EU-oficistoj (kaj de oficistoj de privataj kompanioj),

ŝrumpo de la evoluo de aliaj lingvoj antaŭ ĉio sur teĥnikaj kampoj, kaj ankaŭ rilate politikon.

La pledo de pola senatano dum la simpozio, ke estu en EU ses ĉefaj lingvoj (la angla, franca, germana, hispana, itala, kaj pola) estis travideble nacicentra ("...estas 50 milionoj da pollingvuloj en EU kaj nia lando havas tre specifan historion") kaj senŝanca. Krome oni ricevis la impreson, ke se la pola estus inkluzivita en la elita klubo de lingvoj, la senatano estus surda pri similaj argumentoj de hungaroj, litovoj, ktp. Sed se ĉiuj novaj land(et)oj montriĝus same postulemaj, ili povus almenaŭ devigi debaton pri la temo; oni kontrastu la polan sintenon kun tiu de Slovenio ("...nia registaro pretas simple vendi nian lingvorajton kontraŭ ekonomiaj avantaĝoj," diris virino el tiu lando). La reprezentantoj de ĉiuj novaj EU-landoj krom Polio parolis tre similmaniere: ili timas, ke sur lingva kampo iliaj rajtoj estos ignorataj. La pligrandigo de EU donos eĉ pli da potenco al tiuj fortoj, kiuj celas, ke la angla iĝu la tut-eŭropa lingvo.

KONTRIBUOJ DE EMINENTULOJ

Plej interesaj estis la kontribuoj de neesperantistaj spertuloj. Robert Philipson, kies libro *Ĉu nur-angla Eŭropo?* estas unu el la plej valoraj verkoj por la afero esperanto, refoje prezentis siajn zorgojn pri la aktualaj tendencoj: li vidas en la nuna disvastigo de la angla ne spontanen evoluon sed jam delonge pla-

natan projekton de "usonecigo kaj makdonaldigo" de la mondo. Svisa lingvisto François Grin simile atentigis pri la negativaj kulturaj kaj financaj sekvoj de la sendiskuta glito en anglan hegemonion. Ekzemple, nuntempe la ne-anglalingvaj ŝtatoj de EU pro tio, ke ili devas elspezi grandajn sumojn por instrui la anglan, vole-nevole "donacas" ĉiujare multimiliardan sumon al Britio kaj Irlando; tiuj landoj ne nur evitas grandajn elspezojn por lernado de fremdaj lingvoj, sed profitas de la industriego instrui la anglan al nedenskuloj. David Graddol, anglo, parolis pri neatendata eventuala rezulto de la nuna tendenco: la plua evoluo de la angla al monda hegemonio povus baldaŭ esti malavantaĝo por la anglalingvaj landoj: se oni povos ĉie studi per la angla lingvo, studentoj preferos studi en neanglalingva lando, kie ili samtempe povos lerni alian lingvon. Jam tio montriĝas en Germanio kaj Ĉinio, kie hindoj studas anglalingve malpli koste ol en Britio, Usono aŭ Aŭstralio, kaj krome lernas trian lingvon.

George Durand kampanjas por la franca kontraŭ la angla hegemonio: nuntempe li laboras en Vjetnamio, kaj liaj studentoj rajtas ricevi subvencion por pliprofondiĝi en la franca — sed kiam Durand korespondas tiuteme kun EU-instancoj, eĉ kun samlandanoj, li estas devigita uzi la anglan! Li rakontis pri serio da tiaj absurdaĵoj kiel sekvoj de la nuna tendenco. Abram de Swaan, tre eminenta nederlanda lingvisto, konata kiel entuziasmulo por la angla, diris al mi private dum paŭzo, ke li ricevis pozitivan bildon pri esperanto. Mi supozas, ke temas pri tio, ke li vidis kelkajn homojn mallerte barakti por sin esprimi angle, kaj poste verve-memfide paroli

esperante.

Plej neforgesinde parolis Philipp van Parijs, flandro, por kiu la tuta agado de esperantistoj devas esti misdirekta tempperdo. Van Parijs, ne denaska anglalingvulo, estas tamen speco de misiisto por la disvastigo de tiu lingvo (neniu anglalingvulo povus tiel entuziasmi kaj ne ricevi kritikojn pri lingvo-ŝovinismo; tio iom malakrigis la komenton de Paulin Djité, aŭstraliano naskita en Ebura Bordo, ke van Parijs predikas lingvan novkoloniismon). Van Parijs kredas, ke la angla jam venkis kaj atingis ne plu haltigeblan rolon de monda lingvo. Li tute ne neas, ke tiu situacio estas nejusta, sed nur pro tio, ke la angla estas ankoraŭ grandparte posedaĵo de homoj naskitaj en anglalingvaj landoj. La solvo de la problemo estas kiel eble plej rapide akceli ĝian disvastigon al ĉiuj infanoj de la mondo, ke ĝi fariĝu vere tutmonda posedaĵo de ĉiuj. Por helpi financi tiun finan triumfon de la lingvo van Parijs proponis, ke estu imposto pagenda de anglalingvaj landoj. Do justigo de la situacio. Cetere, van Parijs malpermesus dubladon de anglalingvaj filmoj kaj televidelsendoj; dublado kripligas lernadon de la angla.

Aŭskultante la fervoran voĉon de van Parijs, oni devas agnoski, ke li konstruis nekruadan mondbildon sur sia kredo je la bona rolo de tiu potencega lingvo, kaj ke li estas same "evangelia" kiel konvinkita esperantisto. Tiu "misiisto" povas ĉiutage registri progreson en sia kampanjo; malofte esperantistoj havas kialon por triumfi. Gravas ankaŭ, ke van Parijs ofte konsilas al gravaj EU-instancoj. Do ĉu esperantistoj kapitulacu pri sia ŝajne senŝanca agado?

Tamen restas kelkaj obstinaj deman-

doj. Ĉu vere la angla estas sufiĉe facile lernebla por servi al ĉiu homo sur la planedo? Kaj kia angla estu: ĉu la usona, ĉu alia versio? Kaj ĉu la angla ne konsistas el du parte malsamaj lingvoj, la skriba kaj la parola? Kiel klarigi, ke post jarcentoj la angla atingis nur elitajn partojn de la loĝantaro de Hindio kaj Honkongo? Kaj kial edukistoj en Germanio, Italio kaj aliaj eŭropaj landoj plendas pri “fiasko” de la instruado de la angla?

Kaj eĉ se la angla estus simple lernebla — kia ĝi ne estas — restus aliaj elementoj de la problemo. Unuflanke milionoj da homoj volas lerni la anglan por aliĝi al iu monda komunumo kaj antaŭ ĉio por ricevi pli altan salajron, sed la vasta ondo de la angla ne estas spontana historia fenomeno. Phillipson klare atentigas, ke la angla estas la lingva ilo de tiuj fortoj, kiuj strebas al tutmonda politika, ekonomia, militista, kaj kultura hegemonio. Tutmondigo kaj imperiismo ne tre diferencas unu de la alia.

Al ĉi ĉio van Parijs sendube respondus, ke jes estas nuntempe problemoj, sed ke necesas nur, ke la normalaj homoj kaptu la stirilon, prenu la anglan el la manoj de la elito kaj uzu ĝin por pli bonaj celoj. Ĉu naiva kredo?

Kaj ŝajnas al mi, ke van Parijs neglektas alian elementon, nome la emocian. Ĉu li vere kredas, ke la mondo pretas akcepti kiel definitivan solvon lingvon kun tre neregula strukturo, kiu vole-nevole esprimas la kulturon de unu sekcio de la homaro — prefere al belsona lingvo aparte kreita por esti kiel eble plej facila, kaj pro sia deveno neŭtrala kaj potenciale ĉies?

Povas esti, ke eĉ van Parijs iom

modifis sian juĝon pri Esperanto surbaze de la evidenta pruvo dumsimpozio, ke homoj el multaj nacioj uzas ĝin kvazaŭ propran lingvon. Li diris en diskutgrupo, ke eble estus dumtempa rolo por Esperanto kiel “relaxo” en interpretado. Mi ne komprenas, kiel tio reale aspektus; sed ŝvitinte dum kelkaj tagoj en interpretista kesteto, mi plene konsentas, ke unu rolo de Esperanto estas liberigi la mondon de la neceso interpreti!

KIO ATINGEBLIS?

Antaŭ la komenco de la simpozio ni esperantistoj interkonsentis, ke estus nesaĝe tro malkaŝe montri nian propran konvinkiĝon. Ke la samideanoj ne ĉiam sukcesis, pruvis amika komento de slovaka deputitino, ke ni estas foje “tro evangeliismaj”. Kaj neniu imagu, ke subite Philipp van Parijs svingos verdstelan flagon.

La simpozio estos sukcesa, se oni vekos atenton pri problemoj ĝis nun tabuaj en EU. Ke la lingva demando estas vere tikla, estas tre konata, sed neniu politikisto riskus ŝajni “kontraŭ-angla” kaj pro tio “reakcia, naciisma” — aŭ aliflanke tro amika al la angla lingvo, kio povus fremdigi lin de la propra popolo. Ĝis nun la temo “lingvoj” ne estis honeste diskutata. Ĉu la novaj ŝtat(et)oj de EU tamen levos la temon? Observanto de la simpozio ne tre optimismus.

Lasta komento estas registrenda: lingvistino el Bocvano diris, ke la lingva politiko de Afriko estas rezulto de la eŭropa koloniisma epoko, kaj tiel longe restos. La decidoj, kiujn eŭropanoj faros pri sia lingvopolitiko, decidus ankaŭ la sorton de Afriko. □



• for the beginner

BY JACK BOYD, JOY GARARD, LYDIA GREIG, MARILYN HENDERSON
OF THE MASTERTON ESPERANTO CLUB

This translation of a humorous feline piece is unedited and contains a number of language errors. Beginners, or near-beginners, are invited to correct the text. At the end of the text the editor of *EPK* will present the necessary corrections for students to compare their attempts with. The lines of text are numbered for convenience.

BAZAJ REGULOJ POR KATOJ KIUJ VOLAS KONTROLI DOMANARO

1. *Seĝoj kaj tapiŝetoj.* Se vi deziras vomi, rapide saltu sur seĝo. Se tempo mankas,
2. elektu tapiŝeto-orientan. Se tia mankas, kuseno aŭ eĉ litkovrilo estas bone.
3. *Pordoj.* Se iu fermas pordon, por malfermigu, sidu apude. Se tio ne efikas
4. ĝin gratu. Ne necesas trairi la pordon kiam ĝi estas malfermita. Post kiam vi
5. akiris la malfermon de ekstera pordo, staru mezvoje kaj pensu pri kelkaj aferoj,
6. tio estas plej grave dum malvarma, pluva aŭ neĝa vetero.
7. *Gastoj.* Rapide determinu kiun gaston plej malamas katojn. Sidu sur tiuj genuoj.
8. Se vi povas havi fiŝodoran spiron, tiom pli bone. Certigu ke vi sidas sur genuoj
9. aŭ preterfrotas nur tiajn vestojn kiuj kontrastas kun la koloro de via hararo,
10. ekz., blanka kato iras al nigra lan-vesto. Malestime rigardu tiujn kiujn asertas
11. “Mi amas katojn”. Aŭ ungumu ties ŝtrumpojn aŭ rapide mordetu la maleolon.
12. Kiam vi paradas tra teleroj sur la manĝotablo, ne forgesu montri kaj surprizon
13. kaj ofendiĝon je riproĉo. La ideo estas komuniki — “sed vi permesas min sur
14. tablo kiam gastoj ne ĉeestas!”
15. *Laboro:* Se unu el viaj homoj kudras aŭ skribas kaj la alia estas senokupe,
16. elektu la plenaferan. Ĉi tiun oni nomas asisteme; alie konata kiel malhelpeme.
17. Jen la malhelp-reguloj: kiam oni kontrolas kuiradon sidu je la maldekstra
18. maleolo de la kuiristo kie vi ne estas videble. Estas preskaŭ certe ke ŝi faletos
19. kaj vi ricevos pardonpeton aŭ konsiladon. Por asisti leganto, kuniĝu do ke vi
20. estas inter la vizaĝo kaj libro, krom se vi povas kuŝi trans la libro mem.
21. *Manĝoj:* Ŝajnigu malkontenta, iomete ekflaru la manĝaĵon, tiam piediru for.
22. Neniam trinku el via propra akvujo. Anstataŭe, trinku el la necesejo.

23. *Ludoj*: Estas grave ke vi sufiĉe dormu dum la tago do ke vi povas vige kuradi
 24. kaj salti sur ilia lito inter la duan kaj kvaran matene. Tiam estas ankaŭ taŭga
 25. tempo por praktikado de laŭtmiaŭoj. Via domanaro funkcias pli glate se vi frue
 26. komencas la dresadon. Homoj nepre devas scii la bazajn regulojn. Se vi dresas
 27. frue kaj konstante, la homoj ja lernos.

CORRECTIONS

BY DONALD BROADRIBB

In these corrections I am concerned only with grammatical corrections and use of words. I am not suggesting any alterations in the punctuation, since this is a matter for a different sort of exercise. Because I have not seen the original English text from which the text was translated, I have considered it exclusively from the viewpoint of Esperanto grammar and vocabulary.

Title: *kontroli*. This word in Esperanto means “to inspect”. The English word “control” is best represented as *regi*.

domanaro. This word is the direct object of the verb, so must have a final *-n*. Thus the corrected title would read: “Bazaj reguloj por katoj kiuj volas regi domanaron”.

Line 1: *seĝo* needs a final *-n*. This is because the intended meaning is “jump onto a chair”, and the English word “onto” is represented by *sur...-n*.

Line 2: This is a bit tricky. *tapiŝeto-orientan* is perhaps theoretically possible, but difficult to understand. *Orientan tapiŝeton* would be better, though I think that *azian tapiŝeton* would better give the sense of “oriental rug”.

bone is an adverb. What is required here is an adjective “a cushion or even a blanket is good”: *bona*. I suspect, however, that “suitable” is meant, and instead of “estas

bone” should be *taŭgas*.

Line 3: *malfermigu* needs to be *malferm-igi*. The phrase *por...-i* is standard in Esperanto to mean “in order to...”. The comma before *sidu* causes the reader to ponder the meaning, and would better be omitted.

Line 6: *grave*. This mistake is particularly common among Slavic speakers. The phrase consists of a subject *tio*, an intransitive verb *estas* and what follows must grammatically be an adjective: *grava*. Presumably what lies behind the error is a confusion between such an expression as *Estas grave ...i* “It is important to...”, where the English “It” is merely a space filler; and *Tio estas grava* “That is important” where “that” refers to something specific.

Line 7: *kiun gaston*. This must be *kiu gasto*”, because it is the subject of a sub-phrase.

At first glance it looks like the words *kiu gasto* are the object of the transitive verb *determinu*, but in fact this is not the case.

The actual grammatical object of *determinu* is the entire expression *kiu gasto plej malamas katojn*. Interestingly, a similar error is frequent among English speakers in speaking English, when they are unclear in their minds about the distinction between the use of “who” and “whom”.

Determinu is an unfortunate translation for the particular meaning of the English word “determine” intended here. It would better be translated *decidu*.

tiuj. Literally this means “those”, as if knees had already been mentioned. What is need here is *ties* “that person’s”.

Line 10: *kiujn* should be *kiuj*. “Who assert” consists of a subject and a verb, as a sub-clause which is, essentially, being used as if an adjective.

Line 15: *senokupe*. The intended meaning is “unoccupied”, an adjective, so the word must be *senokupa*.

Line 16: *plenaferan*. It takes a bit of a stretch of the imagination to realize that “occupied” is meant. Better style would be *okupatan*. (Not, by the way, *okupitan*, which is a mistake many Esperantists make.)

Ĉi tiun needs to be *Ĉi tion*. The problem arises because *Ĉi tiu* refers back to someone or something specifically mentioned previously. The only two specifics mentioned in the preceding sentence are persons, the occupied person and the unoccupied person. *Ĉi tio*, in contrast, refers to a thing or action, and never to a person. Esperanto makes a distinction which is not made in English, where “this” can be used in both instances.

asisteme. This is an adverb, and makes the phrase mean “This is called helpfully”. What is intended is “This is called ‘being helpful’”, which in Esperanto is *asistemo*. Similarly, *malhelpeme* should be changed to *malhelpemo*.

Line 17: *kontrolas*. Here the intended meaning is unclear. If the meaning is intended to be “watch”, then *kontrolas* is correct. But if, as in the title of the piece, the intended meaning is “control”, then the correct word is *direkti*, or perhaps *gvidi*.

je should be *ĉe*. “At” in this context means a specific location, which is the meaning of *ĉe*. The mistranslation was presumably based on the use of *je* for the metaphorical (i.e., abstract) use of “at” in expressing time: *je la dua* “at 2 o’clock”.

Line 18: *videble*. Again, an adverb where an adjective is required: “you are not visible” *vi ne estas videbla*.

Line 19: *asisti*. This word has a professional connotation: to be someone’s assistant. It could be argued that a cat regards the action as part of its duties, thus *asisti* is justified. Considering the light hearted nature of the piece, however, the normal verb *helpi* is probably more in keeping. — In either event, since both *asisti* and *helpi* are transitive verbs, the following word must be *leganton*.

kuniĝu do ke vi. This translates as “come together then that you”, which is meaningless in this context. The heart of the problem is the expression *so that* which presumably is intended by the words “do ke”. “So” in that phrase means “in such a way”, which is a meaning the Esperanto word *do* does not have, unlike the English word “so”. For that meaning the word *tiel* is required. *kuniĝu kun li tiel ke vi estas ...* “get together [with him] so that you are ...” would be the correct phrase.

trans is a problem for English speakers. *Trans* actually means “at the other side of”. “He lives across the river” = *li loĝas trans la rivero*. “He went across the river by the ferry” = *Li iris trans la riveron per la pramo*.

In English “across” is also used to mean “on top of”: “the cat lay across the book” = *la kato kuŝis sur la libro*. This is what is intended here.

Line 23: *do*. Again, the meaning desired is “in such a way” or “in order to” = *tiel*.

Line 24: *ilia lito* should be *ilian liton*, since the intended meaning is “onto their bed”.

la duan kiaj kvaran. The *-n* is incorrect both times here. No transitive verb is involved, and there is no other reason for using *-n*. Presumably the misuse of *-n* was caused by the use of such phrases as *La duan de februaro* in which the *-n* substitutes for the words *je* or *dum*. In our text, *inter la dua kaj kvara matene* simply means *inter la dua [horo] kaj la kvara [horo]*.

While the style of the entire text could, and should, be improved by a less literal and more artistic approach to the art of translation, that would be asking too much of a beginner. Good style can only be acquired by prolonged reading of good quality literature: such as the writings of Zamenhof, who set the standard for Esperanto prose; or such writers as Stellan Engholm, Ferenc Szilágyi, Trevor Steele, and other authors of first class Esperanto prose. □

ADELAJDO EKSPERIMENTIS

RAPORTAS TREVOR STEELE



Dum la lastaj jaroj la esperantista agado en Aŭstralio, aparte de loka kluba aktivado, grandparte konsistas el kombino de somera lernejo kaj kongreso.

Adelajdo ĵus eksperimentis pri “vintra kursaro”. Ĉar ĝi estis tute adelajda afero—ne venis samideanoj el aliaj ŝtatoj — ni iom timis, ke tre malmultaj ĉeestos. Sed la rezultoj montriĝis pozitivaj. Mia edzino Katarina (Katja) gvidis verajan komencantojn, kaj havis kvin en

sia klaso (foto). Sandor Horvath gvidis meznivelan grupon, kiu konsistis el ok aŭ naŭ membroj laŭ la tago. Mi gvidis la progresintojn, kaj ili nombris inter ses kaj ok, refoje laŭ la tago.

Krom kursaktivaĵoj estis ankaŭ komuna manĝo, speco de koncerto kaj komuna kantado, konversaciaj rondoj, prelegoj kaj aliaj prezentaĵoj, kaj grupo por tradukemuloj.

La kursaro okazis dum la “longa semajnfino” de la reĝina naskiĝtago. Eble estis eraro “kursi” dum ĉiuj tri tagoj: kelkaj homoj elektis veni nur unu aŭ du tagojn. Se ĉio okazus dum du tagoj, probable ĉiuj dediĉus tiun tempon al nia lingvo.

La sperto estis tre kontentiga, kaj rekomendinda al ĉiuj lokaj grupoj en la lando. Se estus sukcesa “vintra lernejo” en niaj ĉefurboj, ni povus atendi eĉ pli sukcesan “someran lernejon” jarkomence. □

NIA SPECIALA KONKURSO

Sendis ĝustajn respondojn al nia speciala konkurso “Kiu dato tuj sekvis la 12an de oktobro 1582”:

Vera Payne
Ron Gates
Audrey Felby
Hazel Green
Rolf Ahrens

Ron Gates donis tre bonan klarigon kun sia respondo:

“Eblas du respondoj al la demando, ‘kiu dato tuj sekvis la 12an de oktobro 1582?’ Unue, en la jaro 1582 enkondukiĝis, per dekreto de Papo Gregorio XIII, la gregoria kalendaro, kiu anstataŭ la julianan kaj kiun preskaŭ ĉiu lando nun uzas. Kaj, por efektiviĝi la ŝanĝon, la dato, kiu estis la 5a de oktobro 1582 laŭ la juliana kalendaro, iĝis la 15a de oktobro laŭ la gregoria, pro kio la dek datoj de la 5a ĝis la 14a inkluzive malaperis. Do oni povas aserti, ke la 12a de oktobro 1582 ne ekzistis.

Tamen, due, tuj adoptis la novan kalendaron nur kvar landoj, nome Italujo, Polujo, Hispanujo kaj Portugalujo. En la ceteraj landoj de la mondo, inter kiuj troviĝis Anglujo (kiu adoptis la gregorian kalendaron nur en la jaro 1752), la juliana kalendaro daŭre validis dum la deksesa jarcento. Do oni povas aserti, ke en tiuj landoj sekvis la 12an de oktobro 1582 la 13a.”

Hazel Green aldonis ankaŭ detalojn:

“Jen tre interesa demando, kvankam

se en 1582 mi estus en Anglujo, kie supozeble ja loĝis miaj prauloj, mi rimarkus, ke la 13a de oktobro tute normale sekvas la 12an.

Malsame en Italujo kaj aliaj katolikaj landoj: tie en 1582 neniu tago sekvis la 12an de oktobro, ĉar la 12a de oktobro tute ne okazis. Laŭ ordono de papo Gregorio la XIIIa, vendredo la 15a de oktobro sekvis ĵaŭdon la 4an de oktobro, kaj oni “perdis” 10 tagojn.

Antaŭ tiam oni uzis la julian kalendaron, kiu baziĝis sur la supozo, ke ĉiu jaro daŭras precize 365,25 tagojn. Jarcentojn post la enkonduko de tiu kalendaro, la sezonoj kaj la datoj ne plu kongruis, ĉar jaro daŭras nur proksimume 365,2425 tagojn. Por korekti la aferon, oni forprenis 10 tagojn, kaj kreis la novan gregorian kalendaron kun malpli da superjaroj.

Hodiaŭ preskaŭ ĉiu lando uzas la gregorian kalendaron, almenaŭ internacie, sed nur post jardekoj da kalendara konfuzo. Britujo adoptis la novan kalendaron en 1752, Rusujo en 1918.

Fakte ankaŭ la gregoria kalendaro ne estas perfekta, kaj post 3236 jaroj estos eraro de 1 tago. Mi ne perdas dormon pro tio.”

La ŝanĝo de la kalendaro en Anglujo nur en 1752 havis kiel konsekvencon kelkajn tre strangajn efikojn, pri kiuj indus aperigi artikolon iam en *EPK*.

Gratulojn al ĉiuj respondintoj! □

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Sendu al: sudakruco@optusnet.com.au, aŭ PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio.

Limdato por la novembro-decembra numero: 15a de oktobro 2005

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

P. O. Box 419 • Manly NSW 2095 • Australia

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Marcel Leereveld | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: Miranda Lutz | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: Stephen Pitney | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$30 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por sudento aŭ pensiulo: \$20. Asocia membreco: \$10.

Pagu al la Libroservo de AEA ĉe 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.



La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

P. O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • New Zealand

<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: Bradley McDonald | bradley.m@xtra.co.nz

Kasisto: Jackie Fox

Sekretario: Howard Gravatt | hgravatt@ihug.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano.

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto ael-w ĉe UEA, por la Libroservo de Aŭstralia Esperanto Asocio.

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:

PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA